

4 ☆ 1995 ☆ 165

# STARTO

ORGANO DE CEHA ESPERANTO-ASOCIO

15. 8. 1995

forpasis verkisto

Karel Onesork-Pič



## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
aperas 6-foje jare. Abono 15 gld.

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato.

**Membrokotoj:** A 120 Kč, B 60 Kč, C 300 Kč, D 30 Kč, E 30 Kč, F 2400 Kč, G 90 Kč (Starto), eksterlandanoj 20 ECU, enskribo 20 Kč.

## Konferenco ĈES

se letos uskutečni v Brně ve dnech 20.-22. 10. 1995 v hotelu Kozák, Horova 30.

• **Předběžné přihlášky:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno

## Esperantsko-ĉeský slovník

právě vydalo nakladatelství KAVAPECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice za 129,- Kč. Autoři Karel Kraft a Miroslav Malovec, 240 stran, rozsah asi 4-krát větší než u Hromady. Dostává se k nám mnoho výrazů z Plena Ilustrita Vortaro, které dosud v našich slovnících chyběly.

Pro cizince se zájmem o češtinu je určena jeho samostatně vydaná příloha Gramatiko de la ĉeĥa lingvo přehledně zpracovaná M. Malovcem.

## Nova Esperanta-ĉeĥa vortaro

de aŭtoroj K. Kraft kaj M. Malovec ĵus aperis en la eldonejo KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, Ĉeĥa Respubliko.

Por interesigantoj pri la ĉeĥa lingvo aperis memstare eldonita Gramatiko de la ĉeĥa lingvo.

**Mezinárodní festival esperantského filmu a videa**  
organizuje v Brně ve dnech 14. - 19. 10. KAVA-PECH. Informace na adrese: Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

## VINA SEMINARIO

Al la jam 7-a Vina seminario en Vracov 28. 9.- 1. 10. 1995 invitas vin Ĉeĥa Esperanto - Junularo. Atendas vin entute:

☛ prelegoj pri vinproduktado, pri distingado de ĝiaj varioj kaj pri ĝusta gustumado kun praktikaj ekzercoj, faka ekskurso al vinproduktejo

☛ 2 duontagaj busekskursoj al vidindaĵoj en la proksima ĉirkaŭaĵo: kastelo Milotice, mezepoka burgo Buchlov kaj etnografia muzeo en Kyjov

☛ komuna lernado de popolantoj kaj popoldancoj, gaja vespero en vinkelo kun folkloro cimbalona muziko

## Esperantsko-ĉeský vortaro slovník Esperanta-ĉeĥa

Karel Kraft, Miroslav Malovec



## LA UNUA ESPERANTO-TEAMO EN VIENO

Per nekutima maniero varbis la Esperanto-Laborkomitato Aŭstria por la internacia lingvo: La 18-an de junio 1995 ili luprenis malnovan tram-motorvagonon, muntis ŝildojn „Esperanto!“ ambaŭflanke kaj veturis dum tri horoj tra la aŭstria ĉefurbo Vieno. La tramo konstruiĝis en 1928, deĵoris ĝis antaŭ 10 jaroj kaj detale renoviĝis de privata tram-fan-klubo. La tuta varbado kostis 1500 nederlandajn guldenojn por 25 geesperantistoj.

Walter KLAG, Vieno

## Forpasis Karolo Piĉ

La 15-an de aŭgusto 1995 post nelonga malsano mortis en Litomyšl akademiano kaj fama esperantlingva verkisto Karel Onesork - Piĉ, ne ĝisvivinte sian 75-an jaron (nask. 1920-12-06).

En la tuta Esperantujo konata aŭtoro pro siaj verkoj *La Litomiŝla tombejo*, *La Bermuda triangulo*, *La mortsonorilo de Chamblay*, *Klaĉejo*, *Angoro*, *Obsedo*, *Ordeno de verkistoj*, *Ekkrijoj al Georgino*, *Fabeloj el Transe*, *La Davida Harpo*, *Aboco*, *Demandoj kaj problemoj*, *La Granda Superstiĉo*, *Ĝardeno de Alaho*, *Mistero de Tri Unuoj*, *La interna vivo de Esperanto* estis same admirata pro sia stila majstreco kiel malbenata pro siaj eksperimentaj neologismoj, nomataj ofte „piĉismoj“ (ak-ak, nok-nok, erst, ma, forsin, graŭ, nam, olim, blinki, cuki, verberi, hunti, hurti, pita, kolino kpt.).

En nia asocio li multe ne aktivis, restante granda soleculo en Litomiŝlo, sed tiom pli gravan signifon li prezentas por la originala Esperanta literaturo kaj la tutmonda Esperantio.

## 80-a UK en Tampere

Preskaŭ 2.5 mil geesperantistoj alvenis en Tampereon por kongresumi dum la 80-a UK. Inter tiuj ankaŭ dudeko da ĉeĥoj. La bunta kongresa semajno enhavis ĉiujn kutimajn programerojn: En artaj aranĝoj prezentiĝis plej ofte esperantistoj el orienta Eŭropo - Poloj, Rusoj, Estonoj, Litovoj..., vico da fakkunsidoj traktis problemojn movadajn. Prezentiĝis en Tago de libro eldonejoj kun siaj freŝdataj eldonaĵoj, glate funkciis la kongresa universitato, kiu parte formis SUS de AIS de San Marino, kiu unuafoje organizis sian kursaron en kadro de la kongreso. Longajn horojn kunsidis la komitato de UEA, en kiu ni havas unu reprezentanton. Ĝi akceptis novan Kongresan Regularon (pri ĝi legu aliloke), sed la ĉefa punkto estis elekto de nova estraro de UEA. Nun jam duan fojon havas UEA azian prezidanton - li estas koreo, prof. dr. Lee Chong-Yeong. La vicprezidanto fariĝis René Triolle (Francio), ĝenerala sekretario Mark Fettes (Kanado), pluj estraranoj estas Amri Wandel (Israelo), Michela Lipari (Italio), Fred de Geus (Nederlando) kaj Povilas Jegovaras (Litovio). La elektoj ne estis facilaj, ĉar ne multaj pretas agadi en la gvidorgano de UEA. La komitato nomumis du membrojn de Honora patrona komitato - R. Selten, Nobelpremiito, kaj H. Tonkin - kaj 9 novajn honorajn membrojn de UEA (tute eksterordinara nombro), inter ili estas ankaŭ Edo V. Tvarožek el Slovakio. El la komitataj decidoj la plej grava estis la akcepto de *Rumana Esperanto-Asocio* kaj *Unuiĝo Togolanda por Esperanto* kiel landaj asocioj de UEA. Kia estis nia kontribuo al sukcesa rezulto de la 80-a UK? Sufiĉe signifa: jam dum la inaŭguro alparolis kongresanaron la ĉeĥa

ambasadorino en Finnlando sinjorino D. Huňátová invitante ĉiujn al la venonta kongreso en Praha. Ni iom alproksimigis al interesuloj en la kongresa programero *Estontaj kongresoj* nian ĉefurbon - tamen mankis konvena filmprezentado. Du tagojn ankaŭ funkciis ĝiĉeto por varbi al la venonta kongreso kaj ni akceptis dekojn da aliĝiloj. Fine de la semajna programo mi transprenis de samideano J. Laaksonen - la prezidanto de tiea LKK simbolan flagon kaj kun ĝi ankaŭ malfacilan taskon realigi la 81-an UK-on. Dum la *Tago de libro* surtabligis al nombraj spektantoj nia vicprezidanto P. Chrdele novajn eldonaĵojn el sia privata eldonejo: Esperanta-ĉeĥa vortaro (jam longe atendata), libro pri la latina kiel interkomprenilo de dr. Barandovká - Frank, propraplume verkita eseo „Profesia uzo de Esperanto“ kaj aliaj (ĉiuj aĉeteblaj en nia libroservo).

Kiel ferma agrabla surprizo estis sinprezento de partoprenintoj de la infana kongreseto, kiuj ekkantis „Mariŝa, kisu min...“. Multaj kunkantintoj el inter la kongresanoj pruvis, ke la kanto jam sufiĉe famiĝis vaste tra Esperantio.

Fermante la 80-an UK oni akceptis kun aplaŭdo la kongresan rezolucion.

Vlastimil Kočvara

## Kongresa Rezolucio

Universala Esperanto-Asocio,

salutante la 50-jaran jubileon de Unuiĝintaj Nacioj,

- diskutinte pri la temo „*Ni la popoloj*“: *unu mondo aŭ disaj eroj?* kadre de sia 80a Universala Kongreso de Esperanto, kie kunvenis 2443 kongresanoj el 68 landoj de ĉiuj kontinentoj,

- memorigante, ke la Esperanto-movado laboras jam de pli ol unu jarcento por

disvastigi konscion pri la homaj rajtoj, inkluzive de lingvaj rajtoj, kaj por estigi pacan interkompreniĝon inter la homoj de ĉiuj landoj,

- alte taksas la kontribuojn de Unuiĝintaj Nacioj al la paca solvo de konfliktoj, al la tutmondigo de la koncepto pri homaj rajtoj, kaj al la konservado de la vivmedio,

- esperas, ke per komuna kaj urĝa klopodo de la membroŝtatoj de UN tiaj agadoj fariĝos pli efikaj kaj rezultodonaj, interalie per ĉesigo de ĉiuj programoj por evoluigi armilojn de amasa detruado,

- substrekas la nepran bezonon aktualigi la Ĉarton de UN por respondi al nuntempaj postuloj kaj aperontaj defioj, inkluzive ĝian demokratiigon kaj rekonsideron de la principo de senkondiĉa ŝtata suvereneco,

- alvokas la membroŝtatojn de UN trovi vojon al pli rekta kaj egaleca partopreno de la popoloj en la debatoj kaj decidoj de la Organizo, kaj lige kun tio

- emfazas, ke la lingvo Esperanto prezentas elstaran rimedon por tutmonda sen-diskriminacia komunikado, je niveloj interŝtata, interpopola kaj interhoma, laŭ la celoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj en la spirito de la Ĉarto.

## UK kaj ni

Evidente la 81-a UK en Praha estos la plej granda esperantista aranĝo en nia lando ne nur en la jaro 1996, sed fakte en la tuta historio de nia movado en Ĉeĥoslovakio kaj nun en Ĉeĥa respubliko. Al ĝi ni, do, dediĉu nian emon agadi por Esperanto. Kompreneble, ke la ĉefan laboron devos plenumi LKK (*Loka Kongresa Komitato*) kun dekoj da helpantoj, sed meritis pere de UK vigligi la movadon en tuta nia lando. En ĉiuj urboj, en ĉiuj lokoj de nia respubliko oni sciu, ke Praha estos la ĉefurbo de Esperantio en la jaro 1996! Kiel

oni subtenu la UK-on en diversaj lokoj ekster la kongresurbo?

Unua taŭga paŝo estas aliĝi al la kongreso! Oni ja atendas, ke el kongreslando aliĝas ekstrema nombro da interesuloj. Por ebligi tion validas por enlandanoj eĉ rabatita kotizo, kiun LKK interkonsentis kun UEA. Ni scias, ke eĉ kun tiu ĉi rabato estas la kotizo relative alta, sed vi komprenu, ke pagoj, kiujn UEA devas pagi en nia lando pro kongreso, ofte atingas neatenditan altecon. Krome, pluaj prokongresaj pagoj de enlandanoj jam ne estas tiel gravaj, ĉar manĝi oni povas eĉ en Praha sufiĉe malmultekoste - nur scii taŭgajn restoraciojn - kaj malkaran loĝeblecon kapablas trovi en nia ĉefurbo preskaŭ ĉiu ĉeĥo.

Kapablaj esperantistoj sin proponu al LKK kiel eventualaj helpantoj. Kompreneble, la LKK tre zorge elektos laboremulojn, ĉar ankaŭ ties glata laboro bone prezentos nian asocion al miloj da gastoj dum kongresaj tagoj.

Grava afero estas publika informado pri la kongreso. En ĉiuj lokoj esperantistoj publikiĝu ĉu en loka gazetaro, ĉu en radio diversajn informojn pri preparoj de la UK kaj pri novaĵoj ĉirkaŭ ĝi. Informojn vi ĉerpu el Starto kaj aliaj esperantaj informiloj. En kazo de bezono oni povas demandi la LKK-prezidanton, kiu pretas respondi ĉies demandojn.

La UK ankaŭ instigu pli aktivan eldonagadon! Estas dezirinde eldoni aŭ eldonigi diversajn propagandilojn pri - kaj per - esperantajn, kiel jam ekzemple faris Esperantista klubo en Prostějov eldoninte la kalendaron 1996 kun la kongresa emblemo. Taŭgas diversaj prospektoj, broŝuroj, afiŝoj ĉu nur en Esperanto, ĉu nur kiel Esperanta almetaĵo. Ju pli multaj aperos, des pli efike ni konatigos kongresanojn kun nia lando kaj niajn sam-

landanojn kun Esperanto-movado. Certe multaj el la kongresantoj trovos post la UK tempon por travojaĝi nian landon.

Kie eblas, instigu propagandajn aŭ popularigajn ekspoziciojn! Certe la lokaj instancoj ne rifuzos saĝajn ofertojn des pli, se vi provizos ilin per konvenaj ekspoziciaĵoj, kiuj preskaŭ ĉe ĉiu esperantisto abundas. Tia ekspozicio jam prepariĝas en Silezia Landa Muzeo en Opava. Ĉe tiuj oni apenaŭ atendu eksterlandajn viziton-tojn, sed nura informo pri ĝi en la kongresaj materialoj kontribuos al prestiĝo de koncerna institucio.

Specifa subteno al la UK estas havigo de reklamo. Ĉiu scias, ke reklamoj estas grava fonto de enspezoj - kaj UEA ne estas escepto. Ĝi do akceptas pagitajn reklamojn por ĉiuj asociaj kaj sekve ankaŭ kongresaj materialoj - Kongresa libro, gazeto ktp. Tial serĉu eblecojn en via ĉirkaŭaĵo, ĉe konataj kaj pagipovaj firmaoj reklami siajn varojn aŭ servojn en kongresaj materialoj. Ĉiun akceptitan kaj pagitan reklamon oni eĉ honorarias.

Nur skize kaj nekomplete mi informis, kiel subteni la preparatan tutmondan renkontiĝon de esperantistoj en Praha venontjare. Bonvolu pripensi kaj pritaksi viajn kapablojn, viajn eblecojn kaj interesojn - kaj agu tuj, la tempo urĝas!

Pri rezulto de via agado informu LKK-on.

Vlastimil Kočvara

## Kiel organiziĝas UK?

La 29-an de julio, post la ferma ceremonio en Tampere, definitive komenciĝis por ĉeĥaj esperantistoj la antaŭkongresa periodo, en kies fino efektiviĝos la 81-a UK en Praha. Antaŭ ni staras nur ununura ebleco: persiste, plenforte kaj respondeme labori por sukceso de tiu ĉi tutmonda esperantista renkontiĝo. Tial ni ekde nun ĉiunumere

informos la membraron pri aktuala stato de kongresaj preparlaboroj.

Sed por bone kompreni la organizadon de UK, kio certe interesas niajn membrojn, mi unue informu ilin pri nun valida Kongresa Regularo, kiun akceptis la UEA-komitato en Tampere, ĉar sur ĝi baziĝas ĉiuj necesaj laboroj kaj decidoj pri UK. Principe nun UEA transprenas pli da respondeco, pli da taskoj kaj ankaŭ pli da decidopovo rilate al UK ol en antaŭaj periodoj. Ekzemple la buĝeton de UK ellaboras KKS (*Konstanta Kongresa Sekretario*) kaj prezentas ĝin al Ĝenerala Direktoro de UEA por aprobigo fare de Estraro. Loka Kongresa Komitato (*LKK*) ne prenas financajn decidojn ekster kadro de la akceptita buĝeto. Ĉiu kontrakto kun financaj sindevigoj de UK bezonas subskribon de reprezentanto de Centra Ofico de UEA - laŭ artikolo 18 de la regularo. Laŭ kvina artikolo de KR diversajn aspektojn de la kongresa organizado, kiel ekz. kongresejo, loĝado, ekskursoj, oni reguligas per apartaj kontraktoj inter UEA kaj koncernaj lokaj instancoj, kiujn subskribas la Ĝenerala Direktoro de UEA, respektive alia rajtigita reprezentanto de UEA. Do, nek mi, nek iu ajn membro de LKK povas tiujn aferojn trakti kun ekz. Ĉedok aŭ Palaco de Kulturo, ne rajtas nur sekve solvi praktikajn detalojn ĉe realigo de subskribitaj kontraktoj.

Laŭ akceptita regularo UEA plene respondecas por UK en financado - do en kazo de malprofito UEA plene likvidas ĉiujn ŝuldojn. Tiu ĉi fakto ebligas organizi UKon en landoj sen forta nacia Esperantomovado aŭ ankaŭ en landoj tute sen ĝi. Male, pro tiu respondeco el la monprofito de UK apartenas al UEA la pli granda parto ol ĝis nun kaj la organizanto - landa asocio - de UK ricevos ne pli ol 30% de

la profito. Simile la kongresaj eldonaĵoj (bultenoj, Kongresa libro k.a.) estas publikigataj je la kosto de la kongresa buĝeto kaj ilia redaktado okazas en Centra Ofico. LKK povas, kompreneble, kontribui al enhavo de tiuj.

Surloke organizas UKon la Loka Kongresa Komitato, kiun proponas koncerna landa asocio kaj konfirmas la Estraro de UEA (en specialaj kazoj povas organizi kongreson rekte Centra Ofico). Nia asocio agis laŭregule kaj la aprobitan LKKon legu sube. Oni sciu, ke ĝi ne estas ankoraŭ kompleta kaj ni devas rapide alekti ankoraŭ 2-3 laboremulojn. Klaras, ke tiu ĉi kelkpersonna teamo ne kapablas plenumi ĉiujn necesajn laborojn ligitajn kun kongreso. Ĉiu LKKano bezonas propran grupeton de helpantoj, kiu kunlaboru kaj subtenu sian „respondeculon“. Bezonatas kelkdekoj da homoj kaj ni atendas ĉiujn sinproponojn el inter asocia membraro. Oferemuloj regantaj bone la lingvon skribu aŭ al la koncerna LKKano laŭ sia agadintereso aŭ rekte al la prezidanto de LKK. Mi aldonu, ke laŭ Kongresa Regularo eĉ tiuj helpantoj devas aliĝi al UK kaj pagi la kongreskotizon, sed post UK oni redonos la kotizojn al kongresanoj efike kunlaborintaj en la kongresaj aranĝoj laŭ propono de LKK.

Ofte mi ricevas diversajn ofertojn kaj petojn pri ebligo de komerca agado en la kongresejo. Mi ĉi tie citu la 10an artikolon de KR: „Ĉiu vendado de varoj aŭ servoj (aŭ disdonado de dokumentoj) en UK bezonas aprobon de Estraro. Skriba peto pri tiu agado estu liverita al Centra Ofico prefere antaŭ 30-a de aprilo de la kongresa jaro“. Do, similajn tiuspecajn postulojn sendu al prezidanto de LKK, kiu ilin ĉiujn transdonos al Centra Ofico kun eventuala komento aŭ subteno.

## Kaj kion do faras LKK?

Tion tre lakone difinas la artikolo 7 de KR - „LKK devas zorgi, ke la preparlaboroj de UK disvolviĝu en la kadro de la Statuto de UEA, de ĉi tiu Regularo, de la gvidaj principoj de UEA kaj de la buĝeto“ kaj laste la art. 14: „LKK havas taskon regule informi la Centran Oficon pri sia laboro kaj decidoj. LKK sendos al la Centra Ofico protokolojn de ĉiuj siaj kunsidoj.“ La kompleta Kongresa Regularo de UEA estas disponebla por interesuloj ĉe la subskribinto.

Vlastimil Kočvara

## Stato de la 81-a UK en Praha

### LOKA KONGRESA KOMITATO:

**Ing. Kočvara Vlastimil**, A. Sovy 10, 747 05 Opava - prezidanto (provizore respondecas pri la programo)

**Ing. Pluhař Zdeněk**, Lamačova 658/6, 152 00 Praha - sekretario

**Hubnová Květa**, Osadní 2, 170 00 Praha - vicprezidanto, respondecas pri loĝiga servo

**Polnický Pavel**, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady - vicprezidanto, respondeca kasisto

**Řiháčková Eva** - respondeculo pri informado

**Ondráček Jindřich**, Bubenská 17, 170 00 Praha 7 - respondeculo pri kongresejo

**Karešová Lucie**, Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší - junulara programo

**Šmíd Petr**, Kostelecká 1829, 547 01 Náchod- infana kongreseto

**Podhradská Věra**, Poříčí 1, 603 00 Brno - personaro

**Vychodil Jiří**, Žandovská 304, 190 00 Praha 9

**Doc. RNDr. Novobilský Vlastimil**,

Školní 5, 400 01 Ústí nad Labem - rektoro de IKU

Ceteraj personoj estas traktataj.

## AI 81-a UK aperis:

Aliĝilo por la 81-a UK

Oficiala afiŝo

Unua bulteno

La kongresa emblemo proponita de J. Havlík

La materialoj estas disponeblaj ĉe ĈEA aŭ ĉe la 4 unue nomitaj membroj de LKK.

## Rimarkigo de la redakcio:

Ankoraŭ necesas aldoni, ke tuj post la kongreso okazos pedagogia konferenco de ILEI, pri kiu respondecas Ing. Vladimír Dvořák, Zelenečská 354/20, 194 00 Praha.

## Cu Esperanto mortas?

Sub titolo „Esperanto mortas (la lasta)“ aperis komence de julio 1995 en dimanĉa suplemento de la populara ĉeĥlingva ĵurnalo *Lidové noviny* ironia artikolo pri la „pensiula“ Praga Esperanto-klubo. La aŭtoro konstatas, ke Esperanto mortas, ne sukcesinte post cent jaroj de klopodado fariĝi la internacia komunikilo, ĉar venkis la angla. Doktoro Kavka sendis proteston kontraŭ la nekompetenta (mis)informado kaj atentigis, ke por lia scienca laboro Esperanto ĉiam bone funkciis kaj funkcias. Samideano Mařík informis la redakcion de LN, ke pere de Esperanto ĉiujare vojaĝas dek mil turistoj, aperas libroj originalaj kaj tradukitaj, kaj citis plurajn eminentulojn de Eŭropa prestiĝo, kiuj proklamis, ke ili ne kredas, ke la angla venkos, eĉ ne deziras tion kaj ke ili preferus Esperanton.

Mi mem sendis al la redakcio informojn pri la venontjara UK en Prago kaj esprimis opinion, ke la homoj interparolas kun eksterlandanoj ne por venkigi iun ajn lingvon, sed por interŝanĝi informojn. Havas nenian sencon disputi, kiu lingvo venkis aŭ venkos, ĉar ne tio estas celo de la internacia komunikado. Eĉ plej sukcesajn mondlingvojn scias ellemi apenaŭ triono de loĝantaro, do Esperanto havas sufiĉe vastan kampon por sin utiligi sendepende de la sukcesoj de aliaj lingvoj.

En la sama tempo publikigis alia ĵurnalo, *Svobodné slovo*, artikolon „En nia teĥnika civilizacio la scienco bezonas komunan lingvon. Ĉu restos la angla en tia funkcio?“. La artikolo pritraktas ankaŭ Esperanton, „kiu ne trovis en la mondo pli gravan aplikadon“, konkludante: *Lingvo universala estas ja bezonata, sed tia komunikilo povas fariĝi nur lingvo natura, viva, efektiva*. Ne havus sencon aserti, ke la mondo male bezonas lingvon nenaturan, nevidan, neefektivan. Sed dependas precipe de nia propra utiligado, al kiu kategoria apartenas Esperanto.

*Eventoj* alparolis la esperantistaron: Ne ploru, sed agu! Ankaŭ mi opinias, ke ni ne polemiku per vortoj, ke la aŭtoroj de la supre aluditaj artikoloj eraras, sed ni pruvu ilian eraron per nia laboro, por kio la Universala Kongreso en Prago 1996 estas la plej taŭga okazo.

Miroslav Malovec



## Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature 5

Josef Kavka

-US-

Jen nia kvina problemo (kp. antaŭajn numerojn de Starto): El terminologia-nomenklatura vidpunkto evidente ĝenas, en Esperanto, iuj vortoj kun la radikfina -US-. Da koncernaj fundamentaĵoj ekzistas nur 5: fokuso (*focus*), konuso (*conus*), korpuso (*corpus*), moruso (*Morus*), poluso (*polus*). La ĝeno konsistas ĝuste en tio, ke la latinaj ekvivalentoj ne havas tiun -US- kiel radikparton, sed kiel finaĵon, malaperantan en deklinaciaj formoj, derivaĵoj, kunmetaĵoj, dum en Esperanto temas pri kohera parto de la radikoj.

Nia Majstro simple klopodis eviti homonimecon kun ekz. foko, kono k.t.p. Aliflanke li siatempe ne povis plene taksii terminologiajn konsekvencojn. Foko (Phoca) kaj fokedoj (Phocidae) restas ĉi-solve senriproĉaj, dum kelko da optikaj terminoj (ekz. „bifokusa, disfokuseco, hiperfokusa, kunfokusoĵ“ laŭ PIV kaj K. Verks, 1906) aspektas iom pezmome, komparate kun siaj etnolingvaj ekvivalentoj. Simila situacio aperas okaze de konuso, kies etimologia kohero kun ekz. koniko, konikoido, koninkona strukturo, konoido, konometro, konoskop(i)o restas en la internaciaj terminologioj pli bone perceptebla ol en Esperanto.

**Korpuso**, kies deklinacio latina havas la genitivan *corporis*, estas en PIV difinita kiel termino milit-afera, sed fakte ĝi estas uzata ankaŭ en jurscienco, medicino, muziko k.a. Do levigas demando, ĉu ne sufiĉus korpo, kiu laŭ PIV havas ok signifojn, do facile eltenus la naŭan...

**Moruso** kaj morusacoj estas malfacile akcepteblaj en la botanika nomenklature.



Pli bone taŭgus moro kaj moracoj. La homonimeco kun la fundamenta moro (el la latina *mos*, genitive *moris*) apenaŭ ĝenus, se ne ĝenas ekz. la parenca embriologia termino **morul-o**, homonima kun **mor-ulo**.

Okaze de **poluso** montras sin ĝenoj analogaj al konuso, t.e. malkohereco kun multaj internacie kodigitaj terminoj: polara, polarimetro, polarizi, polarografo, polaroido k.a. Kial uzi por elektro la verbon „polusigi“, sed por lumo „polarizi“, se temas fakte pri analogaj fenomenoj? La lingvoj etnaj prave ne distingas, ekz. *en: polarisation charge, current, of light, plane, tube* k.a.

Kiel zamenhofa estas en PIV registrita ankaŭ **lotuso**, sed kun kvar signifoj: 1. el la familio de „legumenacoj“, moderne fabacoj, la genro devus esti nomata prave, kvankam homonime, **loto** (*la: Lotus*, genitive *Loti*); 2. el la familio de nimfeacoj **nimfeo lota** (*Nymphaea lotus*) kaj **nelumbo nuksoporta** (*Nelumbo nucifera*), por kiuj pli eble taŭgus la komunuza nomo **lotoso** (egipta, hinda); 3. mitologia frukto, nomenklature enigma, por kiu same povus resti la komunuza lotoso. Tiun ĉi nomon prave registris PV (1964) kaj multaj vortaroj Esperanto-etnolingvaj, sed en PIV ĝi mankas malgraŭ sia konsiderinda internacieco. Escepte de la franca kaj angla (*lotus*), granda plimulto de lingvoj etnaj havas la formon **lotos** (*cs, el, hr, la, pl, sk, sl, ru* k.a.). La germana estas **Loros**, la itala **loto** k.t.p.

Fine, zamenhofa estas ankaŭ **krokuso** (*Crocus*) el iridacoj. Ĉar en la botanika nomenklature ekzistas speciaj epitetoj *crocatus* kaj *croceus* (= kroka, krokeca), la genronomo scienca eble devus havi la formon **kroko**. Cetero la mineralo **krokoito** estas nomita laŭ **kroko**, pro sia koloro. Jen

koneksoj atentindaj.

Da **neoficialaj**, de ni ĉi-konekse intere-sataj, estas surprize malmulte, nome tri: „**papiruso**“ (*Cyperus papyrus*), pli ĝuste **papiro** el ciperacoj, „**rubuso**“ (*Rubus*), pli ĝuste **rubo** el rozacoj kaj „**taksuso**“ (*Taxus*) el „**taksusacoj**“. Jen okulfrapa arbitreco nomenklatura. Dum *Cyperus* kaj *Cyperaceae* estas senriproĉe esperantigitaj per ciper-o, -acoj, *Taxus* kaj *Taxaceae*, pro homonimfobio antaŭ la fundamenta verbo **taksi**, estas misformitaj. Memkomprene, la pinofit-genro devus nomiĝi en Esperanto **takso** kaj la familio **taksacoj**. La kontraŭkancera diterpenoido estas taksolo, nomita laŭ *Taxus*.

Da **neoficialaj** -US-nomoj en Esperanto generiĝis - bedaŭre - iom tro multe, por ke ili estu esplorataj ĉi-loke. Ni atentu almenaŭ iujn. Apud la PIVa formo en citiloj, ni prezentas la substrekitan formon, laŭ nomenklatura vidpunkto pli taŭgan:

1. „**alvuso**“: **alvo**. Tiu ĉi evidente pli bone koheras kun la sam-etimaj fundamentaĵoj alveolo, alveolito kaj kun ceteraj terminoj ekz. alveografo, alveolaro, kie ĉie la latina finaĵo -US- nature forfalas. Ankaŭ la botanika speci-epiteto *alveiflorus* (= kavaflora) apartenas ĉi tien.
2. „**antuso**“ (*Anthus*): **anto**. Temas pri genronomo de paseroformaj birdoj: *A. campestris* = a. kampa, *A. cervinus* = a. cerva, *A. novaeseelandiae* = a. novzelanda.
3. „**apuso**“ (*Apus*): **apo**. Jen genro el la birdoj apoformaj (ne „apusoformaj“).
4. „**boluso**“ (*fr: bol, it: bôlo*): **bolo**, speco de argilo. Ekzistas bolecaj grundoj k.a.
5. „**citruso**“ (*Citrus*): **citro**. Genronomo el la familio de rutacoj. Kp. sam-etimajn **citralo**, **citr(at)a acido**, **citrino**, **citrofeneno**, **citrono** k.a.
6. „**kornuso**“ (*Cornus*): **korno**, genronomo

de arbedoj (science: frutikoj) el la familio de kornacoj (*Cornaceae*), ne „kornusacoj“. La homonimeco kun ekz. cerva korno certe ne ĝenus; male, la frutikorcevis sian nomon laŭ lignodureco, memoriganta pri korno (*la: cornu*).

7. „paduso“: **pado**. Apenaŭ ĝenos la koincidon kun irvojeto. ĉetere, en la botanika nomenklaturu ekzistas specia epiteto *padifolius* = *padofolia*, laŭ simileco de folioj al tiuj de l' arbo *Prunus padus*. Ĉu vere plaĉus „padusofolia“?

8. „prunuso“: **pruno**. Same kiel **pado**, tiu ĉi arbo apartenas al la ordo de rozaloj, la familio de rozacoj (ne „migdalacoj“ iaŭ PIV), la subfamilio de **prunoideoj** (ne „prunusoideoj“). Ankaŭ ekzistas la specia epiteto *prunifolius* = **prunofolia**, ne „prunufofolia“.

9. „stiluso“ (*el: stylos, la: stylus*): **stilo**. En la helena lingvo ĝi signifis stangon, kolonon. Kial timi konfuzon de florparto kun belarta maniero, se en PIV ekzistas ankaŭ **stilet-o** kaj **stilobat-o** (certe ne bato kaŭzita de belarta verko). Pardonu pro la ŝerco, sed la homonimfobio incitas nin foje ...

10. „tinuso“ (*thynnus*): **tino**. Sen komento.

11. „viruso“: **viro**. En PIV estas registrita ankaŭ la nepre internacia **virozo** = „virusozo“. EMT (1979) krome registras la medikamenton **viricidon**. Aliflanke la scienco pri **viroj** kaj **viroidoj** (ne „virusoidoj“) estas internacie kodigita kiel **virologio** (ne „virusologio“).

Fine ni dediĉu nian atenton al la nomenklaturu de nuboj, por vidi, kien kondukas senbaza timo antaŭ homonimeco. Ĉi-konekse mia memoro refreŝigas la latinan heksameton: *Incidit in Scyllam, qui vult vitare Charybdim* (Falas en Scilon, kiu volas eviti Ĥaribdon. Laŭ Zamenhof: *trafi*

*de Scilo al Ĥaribdo*). La latinaj nubnomoj estas *Cirrus, Cumulus, Nimbus, Stratus*. Laŭ PIV: „ciruso, kumuluso, nimbuso, stratuso“. Sed en EB (1988) ni trovas por *Stratocumulus*: „stratokumuluso“. Kial ne konsekvence „stratusokumuluso“? Ĉu ne timi, ke temus pri „kumuluso surstrata“? Samkiel la urba strato, ankaŭ la ĉiela strato estas kvazaŭ sternitaj. Nome, la latina supino *stratum* apartenas al la verbo *sternere* = sterni. Do oni ne timu la homonimecon, sed male aprezu la elvokivecon de la nomoj. Konsekvence ni rekomendas: **cirostrato, nimbostrato, cirokumulo, kumulonimbo** k.t.p. Jen la logikaj Esperanto-kunmetaĵoj anstataŭ novaj radikoj!

Por ne kaŭzi miskomprenojn: Nia analizo ne celas ekstermi ĉiujn -US-nomojn el la leksiko de Esperanto. Interesas nin unuavice la botanika kaj zoologia nomenklaturu, kiujn la zamenhofa lingvo nepre devas adapti al la greklatinaj, internacie kodigitaj. Ni ne celas ataki komunuzajn terminojn, popolnomojn k.t.p.

Zorge ni distingu, ĉu tiu aŭ alia -US-vorto fakte devenas de la latina deklinacio laŭ la modelo *servus*, genitive *servi*. Ekz. la PIVa pampelmuso estas ĉerpita el la franca *pamplemousse*, do havas nenion komunan kun nia problemo. Ankoraŭ alia okazo estas „bambuso“. Ĝia latina genronomo estas *Bambusa*, do ĝia intervokala -S- devus esperantigi pli eble per -Z-: **bambuzo**. Tamen, ankaŭ tio ĉi ne koncernas nian problemon. Lastekzemple ni menci la zamenhofan: **lakmuso**, el la mederlanda *lackmoes* (= laka musko), germane *Lakmus*, vaste internacie *lakmus*. Temas do pri perfekte esperantigita termino.



Por veni al konkludo, ke la -US-vortoj de nia problemeca tipo apenaŭ havas perspektivon, ni povas apogi nin sur sennom-

braj precedentoj, kie la origina latina finaĵo -US- post esperantigo forfalis. Ni menciuj iujn: algoritmo, ciklo, cirko, **entuziasmo**, fisko, genio, himno, humo, ĉiuj -ismoj, ikto, **kakto**, logaritmo, **lukso**, marasmo, menisko, mito, nuncio, obolo, **orgasmo**, pleonasmo, rito, ritmo, **sekso**, **suko**, tropo, **uzo**. (Ni substrekis la zamenhofaĵojn.)

## Fontoj:

Elementa fotografa optiko (1906). *K. Verks.* - Presa Esperantista Societo. *Paris.*  
Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento (1964). *E. Grosjean-Maupin.* - Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris.*  
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970). - Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris.*  
Esperanta Medicina Terminaro (1979). *J. Hradil.* - Universala Medicina Esperanto-Asocio.  
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento (1987). - Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris.*  
Esperanta Bildvortaro (1988). *R. Eichholz.* - *Esperanto-Press. Bailieboro.*  
Inversa Vortaro de Esperanto (1989). *B. Pabst.* Esperanto-Centro. Paderborno.

## GLOSOJ AL HETAJRO

dura malmola  
hetajro helena dancistino   
live maldekstre  
neglekti ne atenti  
sob! malsupren  
ŝika lerta 

## LA HETAJRO DANCAS

Eli Urbanová

Doksy 1949

(*El la tria ĉapitro, kiu titolas „La vivo ne finiĝis, ne, ne!”*)

Kiel la tempo flugas! Jam kvin jarojn daŭras la paco. Jam la kvaran fojon oni proponas al la interesigantoj pri Esperanto unikan eblon travivi libertempon en Somera Esperanta Kolegio en Doksy, ĉe la lago Mácha. Denove kaj denove mi tralegas konceman prospekton. Post la kurso-fino mi farus ekzamenon pri lingvoscio. Ŝtefo sin al la studado normale ne devigos. Duontagon li en la benkoj eltenos, almenaŭ mi esperas, kaj post la tagmezo - pli idealan ripozmedion mi ne scias imagi. Ne senkaŭze oni nomas la lagon Mácha „la maro de Bohemio“. Kaj se pluvus, kia helpo, ni rifuĝus en kafejon. Cetere Ŝtefo nepre kunportos la gitaron. Simple mi tion riskis kaj forsendis la plenumitajn aligilojn kaj la monon. Mi konfesos nur poste. Okaze. Nur kiam estos la afero aktuala.

Mi dezirus al vi aŭdi tiun predikon. Ion mi prenos al mi en la kapon kaj pelas min post tio kiel virŝafo. Mi ne rigardas dekstren nek liven. Kaj tiel plu. Sed ĉar tio estis jam pagita...

Do ni malgraŭ ĉiuj obstakloj ekestis en Doksy. Dimanĉe, la tagon antaŭ la inaŭguro. Kiam ni senigis nin de la valizoj - ni loĝis en privata vilao kun bela florgardeno - ni ekiris serĉi decan restoracion, kie ni nin satigus. En la unua ne estis el kio elekti. La dua estis fermita. Kaj en la tria, en kiun ni sufiĉe irlacigitaj kaj kun murmuretanta stomako enfalis, oni alportis al ni bovaĵon duran kiel pland-

umo. Tio estis por nia solinfano tro. - Strange oni ĉi tie zorgas pri la turistoj, vere! Eĉ manĝi oni ĉi tie ne povas!... Memkomprene ĉion kulpis mi. - Se ni restus hejme, ni farus pli bone! Mi havas cent emojn reveni Pragon!... Estis terura tago. Jam ke venu lundo kaj io okazu!

★ ★ ★

Matene mi vekigis kun unusola deziro - ke estu ekstere bele. Estis belege! Kaj tiu silento kaj tiuj aromoj, kiam ni eliris antaŭ la domon! Ne kiel en Prago!

Ankaŭ la komuna matenmanĝo estas tute bongusta. Dum en nia ventro vastiĝas agrabla varmo, ni observas la zumadon. Pimulto el la partoprenantoj simile kiel ni nur orientiĝas. Kelkaj ankoraŭ treniĝas kun kofro. Tie ie aŭdatis Esperanto.

Ĉar Ŝtefo apartenis en alian grupon ol mi, ni interkonsentis, ke ni nin tuj post la instruado atendas. Bonege! Tiun duontagon mi pensas plie pri Ŝtefo ol pri tio, ke mi klerigadu. Vi komprenas, mia edzo estas senkompatate kritikema. Tial mi ne faras al mi iluziojn.

Finite! Do nun mi ekscios, kiel tion Ŝtefo transvivis. Se li enuis, liaj riproĉoj ne maltrafos min. Sed mi lin en tiu amaso vane serĉas. Ni devis ja renkontiĝi ĉe la enirejo en la restoracion. Mi ekrigardas enon kaj jen! Ŝtefo estas jam ĉi tie kaj kun ĝuo konsumas porkaĵon kun knedbuloj kaj brasiko. Ĉirkaŭita de siaj novbakitaj geamikoj! Kaj li neniel zorgas, kie troviĝas lia edzino! Normale min ĉagrenus, ke li min tiel neglektis, sed hodiaŭ mi al li kun rideto mansvingas, ke ĉio estas en ordo, kaj sidiĝas egale kien, kun kiu ...

★ ★ ★

Venkite do. Nun min interesus, kio kaŭzis tiun renverson, kio Ŝtefon tiel entuziasmigis. Estis la Cseh-metodo en la prezento de Ŝolk, okupito de la aŭtofabriko

Škoda en Mladá Boleslav. La metodo, kiu neniam eksmoderniĝos. Tamen ne ĉiu povas iĝi sukcesa Cseh-instruisto. Ŝolk estis la ĝusta tipo - energia, parolpreta, ŝika. Lia dujara aktivado en Belgio - la instruistan diplomon li gajnis de la Internacia Esperanta Instituto en Arnhem - faris el li memcertan spertulon. Tio ne estis ordinara instruado, tio estis koncerto. Kia miro, ke Ŝtefo kaptiĝis, tia bela amuzo, ĉu ne? Nur tiel pluen!

★ ★ ★

Ŝtefon imponis Ŝolk kaj min Ŝpur, alie oficisto de la loka ŝparkaso. Ĉi tiele devus aspekti la kurso por la progresintoj, jes, ĝuste ĉi tiele! Ju pli profunden mi penetras en la lingvon, des pli da avantaĝoj mi en ĝi trovas. Unu el ili estas la fonetika ortografio - skribu, kiel vi aŭdas. Ne kiel en la angla - oni tion skribas kato kaj legas tion hundo... Tabelo kun la pronomoj estas afero de praktiko ... Ankaŭ da diversaj prefiksoj kaj sufiksoj, pere de kiuj oni kreas pliajn vortojn, estas sufiĉe; ĝis nun mi memoras dis kaj for kaj mis kaj re ...

Ŝpur sciis al mi plaĉi. Ĝis kiam li ne demetos la plumon, ĝis tiam li pri mi pensos. Mi sidis en la unua benko kaj sekvis ĉiun lian movon. Li ludis kun ĝi la tutan horon! Kaj dume - li sensacie eksplikadis. Kaj iam, fakte sufiĉe ofte, li karesis min per tiaj siaj dolĉaj okuloj. Li estis ne nur sperta instruisto.

Liajn privatajn kromlecionojn donatajn al ni kelkaj inter la baniĝado partoprenis ankaŭ Ŝtefo, kvankam tiu preferis ie en ombro debati ĉeĥe kaj min trankvile lasis kiel oferon...

Kaj poste estis ĉi tie la dancparteroj sub lumanta lanterno. Tuj ĉe la lago. Kelkajn metrojn disde la arbaro. Ankaŭ ĉi tie Ŝpur zorgis pri sia lernantino. Mi ne scias,

ĉu li tiel kondukis al ĉiuj virinoj, sed ĉiam, kiam oni ĉesis ludi, li kaptis miajn manojn kaj dum li ilin al mi kunfermis kaj premis, per la dorso de la siaj li kvazaŭ senvole tuŝadis miajn mamojn... Ĝi estis tia ŝajne senkulpa incito en limoj de ĝentileco... Simple la fiŝisto refoje disjetis siajn retojn...

★ ★ ★

La direktoro de la kolegio, doktoro Pitlík, havis sian gloran eraon jam post si. En la jaro 1912 la Ministerio por Komercio subvenciis al li duonjaran rondojaĝon. Liaj paroladoj en Esperanto pri Prago, pri ĉeĥoslovakaj etnaj kostumoj kaj pri la gimnastika movado Sokol estis tradukataj en naciajn lingvojn. Post la usonano Parish li tiel vojaĝis kiel la dua en la mondo kaj la unua en Eŭropo. Li vizitis tiam 11 ŝtatojn kaj prelegis en 33 urboj. La plua unuafojeco - en la jaro 1923 li la unua parolis Esperante en la Radio Prago. Ree pri nia lando.

Hodiaŭ oni uzas la internacian lingvon ĉie alie ol ĉe ni. Komencante de niaj najbaroj, konkrete en Hungario kaj Pollando, kaj finante eble - eble en Ĉinio. Mi ne komprenas, kial ĝuste ni en tiu ĉi direkto tiel tardigas. Kial ni denove ne kaptas ĉi tiun ŝancon. Nia damaĝo!

Plej multe al mi plaĉis la rakontado de doktoro Pitlík pri Hispanio. Similajn aŭskultantojn li ĝis nun ne ekkonis. Infanoj ne povis konduki pli senbride. Ili libere amuziĝis, laŭte vokadis sin, knarigis la seĝojn, eĉ iom lin ne respektis. Ĝis li koleriĝis, ne plu sin regis, pugnigis sur la tablon kaj ekkriis je ili ĉefe: Vi virbovoj, vi kretenoj per du, vi impotentuloj!... Kaj vidu, tuj estiĝis silento kiel en preĝejo kaj ili favorapogis lin ĝis la fino, ĝis la projekcio de la lasta lumbildo!

Kaj kun tiu ĝentlemano mi devas

inaŭguri la karnavalon. Kia honoro por mi komencantino! Oni ludos polonezon kaj ni du paŝos fronte de la maskerada procesio. La problemon kion vesti helpis al mi solvi nia domestrino. Sur nigran satenan korsajon mi alfiksis rozon. Pale flava jupo ŝajnis por ŝi mem tro longa, tial ŝi demetis ĝin, kaj kiel ĝi nun taŭgas. Tio, ke ĝi al mi falis je peco pli infren, tute ne gravas, male, la nuda haŭto kun la umbiliko en la mezo estas ege efekta. Ankaŭ Ŝtefo kapjesis, ke tio konvenas, ke tio al li plaĉas. Sed la kalsoneton mi ne prenos, supre ĝi videblas kaj la impresoj estus for. Do mi trankvile iros sene. Ĉefe, ke mi havas la vizaĝmaskon.

Restas aldoni, ke danke al mia improvizita robo mi preskaŭ truis la planduojn. Domaĝe, ke oni tiun vesperon ne elektis Miss Esperanto...

Noktomeze oni anoncis la daman dancelekton kaj mi memkomprene ekstaris antaŭ doktoro Pitlík. Kiel mi konstatis, frapis en li koro de junulo. Kial li ankoraŭ hodiaŭ, en sia aĝo, poemadus je la temo „virino”? Preterdire, li promesis al mi, ke unu poemeton li verkos speciale por mi. Nu, neplenumite! Sed nun mi volas al li repagi, ke li honoris min per sia favoro. Li, tia signifa esperantisto. Li, Iu! Viron, kiu sidis ĉe lia dekstra mano, mi apenaŭ rigardtuŝis. Mi estis tro ebrigiĝinta per mia socia sukceso por lin percepti. Kaj tamen de certa momento mi vidis nur lin, nur lin unusolan... Sed la tempo ankoraŭ ne maturiĝis...

★ ★ ★

Kaj preparitas la plua sinjoro „por esti razita”: majstro Slanina. Viro, kiu estas sur la podio kiel hejme. Ĉu viro aŭ koboldo el horora fabelo? Ĝi ne iras al mi en la kapon. Aliulo lialoke turmentiĝus, enrampus ien en angulon... Tiu lia tiel no-

mata oratora kurso! Tiuj liaj konsiloj kiel senigi sin de tremo! Tiu lia memfido! Mi havis impreson, ke al li apartenas la tuta mondo!

Slanina. Unu el la Doksa seso. Ni siestas, li redaktas la stencilitan gazeton Verda Voĉo. En unu numero mi aperigis poezian ŝercaĵon de ia Piĉ. Poemeton sen vortoj konstruitan per sole senakcentaj piedoj de la metro. Per duonarketoj, kiuj similas al ondoj sur la lago Mácha. Aj, ci spritulo! Propre kiu estas tiu Piĉ?

Slanina populariĝis ne nur kiel esperantisto, sed ankaŭ kiel tajloro. Al mi li pretigos ŝikan vintran kitelon el nigra ŝtofo, omamitan per kolumo kaj manumoj el griza persa felo. - Do tio estas tiu via reĝlando... Li invitis min en la provujon, prenis al mi ĉirkaŭmezuron de la brusto, koksoj... Mi scivolis, ĉu li ion al si permesos. Ne! Liaj tuŝoj estis pure profesiaj. Dume mi aŭskultis, kiom da inoj li povus havi... Certa klientino atendis, ĝis li glados al ŝi la mantelon. Kiam li poste al ŝi turniĝis, ŝi staris antaŭ li nuda... Kio min tre surprizas. Kvankam iam pli gravas, kion la ulo diras, ol kiel li aspektas. Kaj paroli, tion Slanina scipovis. Li scipovis tion kiel, ke oni tiun lian ĝibon eĉ ne perceptis kaj liaj elrulitaj okuloj ŝajnis preskaŭ belaj...

Pri Slanina ankoraŭ jenon: Kiam la aktoroj, kiuj aktivis en la Verda Stacio en Brno, transiris Pragon, en la Nacian Teatron, estis li, kiu organizadis iliajn programojn en la Esperanta elsendado de la Radio Prago. Toni, Toni, vi donis al mi! Kvazaŭ mi kulpus pro tio, ke Karel Höger, kiun mi pli poste intervjuos, tiun ĉi etapon preterpasis kaj mencias nur pri sia naskiĝloko Brno.

Antaŭ Slanina la ĉapelon sob! Li estis tiel kuraĝa! Li sciis rezisti al la sorto. Li sciis al ĝi multofte freneze ekridi. Ni

spitos! Ni ne timas batali! Ni aŭ falos, aŭ venkos! Slanina venkis. Lia komplekso lin levis sur la plej altan eskalŝtupon, kiun li povis atingi. Majstro Slanina. Slanina filozofo kaj ribelulo. Slanina iom stranga Donjuano. La masko de la histriono cindriĝis. La heroeco restis.

★ ★ ★

Vítek male estis laŭvorte reprezenta staturato. Tiu, kiam li vestiĝis, povis iri rekte al la prezidento, tian li havis figuron. Sed ankaŭ konduton. Vi konas tiujn tipojn. Je la unua rigardo ili vekas respekton.

Ĉi tie en Doksy al ni la fakinstruisto Vítek rakontas pri siaj vojaĝoj. Antaŭ du jaroj li estis sendita de la Ministerio por Informado en Svedujon, por ke li tie dum kvin monatoj prelegu pri Ĉeĥoslovakio. Li parolis Esperante en 65 urboj. Loka esperantisto tradukis lian prelegon en la svedan lingvon. Pasintjare li simile travivis unu monaton en Danlando kaj Norvegujo. Kaj ĉi-jare li revenis el Parizo, kie li instruis la ĉeĥan.

Jozefon Vítek mi spertis plurfoje. Li ĉiam sekvis la saman fabulon. Ni alveturis, manĝis, tranoktis. Nur en fremdlando - ni esperantistoj diras eksterlando - la niulo ekkonas, kien li apartenas kaj kion tio signifas senti sin ie hejme. En tiu ĉi loko al Vítek regule ektemis la voĉo pro emociiĝo kaj li por momento eksilentis. La paŭzo estis plena de streĉo. Ĉiuj atendis, ke li ektrumpetos en poŝtukon. Ni alveturis, manĝis, tranoktis. Nun li komencos pri la fratoj slovakoj. Kaj vere. Li ĉiam finis per tio, ke li havas al ili varman rilaton.

Hazarde Jozefon oni ŝatis aŭskulti. Kaj se lin iu iam suspektis, ke li sian patriotismon pretekstas, li ege eraris. Ne, tio ne estis pozo. Tiu homo ĝin pensis serioze. Kaj same bone li sciis, kion li diras kaj kial li tion diras, kiam li parolis pri slova-

koj. Pardonu, pri fratoj slovakoj! Ne, tio ne estis vaka frazo. Li efektive tre, tre favoris ilin.

Brave, Vítek, mi vin aplaudas! Jes, esti internaciisto, sed esti antaŭ ĉio ĉeĥo. Ĉeĥo, ne ŝovinisto!

★ ★ ★

Dek kvar tagoj forpasis kiel akvo. Vespere ĉe la bivakfajro ni komune kantas kaj fino. Morgaŭ ni disveturos al ĉiuj flankoj.

Ankaŭ la vetero iel difektiĝis. Ĝi nepre ne logas nin eksteren. Plej frue mi metas en la kofron mian ateston pri lingvoscio. Ŝtefo diference de mi similan dokumenton ne aspiras. Je unu papero pli aŭ malpli. Gravas interkompreniĝi.

Cefe ke li min ne insultas. Mi nome havas pekon kiel tondron. Sed mi ne povis esti kaj ĉe la kultura vespero kaj ĉe la lago. Mi ne povis aŭskulti, kiel tio al Ŝtefo sonas kaj samtempe rendevui kun Ŝpur. Mi devis elekti. Kaj Ŝtefon mi aŭdas senĉese. Kaj samideanon Ŝpur mi ekvidos eble post jaro.

Kaj poste ni sidas ĉirkaŭ la fajro kaj iu instigas profesoron Kožený, ke li ion recitu. Kaj el la lasta vico levigas tia modesta sinjoro kaj starigas en la rondon. „Adiaŭ kaj se ni nin neniam plu renkontos, estis tio superbela kaj estis da tio sufiĉe...”

Profesoro Kožený. Aŭtoro de la lernolibro, kiun mi kunprenos, kiam mi en la jaro sesdek naŭ flugos en Brition por tie instrui Esperanton. Ja li akompanas min eĉ sen scii pri tio. Ja li briligita per malkviete flagrantaj flamoj deklamas al mi en la fora eksterlando versojn de la ĉeĥaj poetoj Nezval, Seifert, Mácha... Ja mi ekkonas lian voĉon! Lian civilan, neniel hiperfortan parolmanieron! Lian asimetrian, kvazaŭ neĉeestan rigardon!

Ho, tio estis ensemblo, tiu en Doksy

1949, la ekstra, la elita, la neforgesebla! Pri tiu verki odon aŭ almenaŭ bluson!



## Plua internacia kongreso en Olomouc

La urbo Olomouc jam kelkfoje fariĝis kongresa urbo, en kiun alvenis esperantistoj el propra, sed ankaŭ el aliaj landoj por partopreni kaj ĝui kongresan etoson. La lasta el vico de tiuj kongresoj kun internacia karaktero, kiun Olomouc gastigis, estis la 48-a kongreso de IKUE, kiu efektiviĝis en la tagoj 8. - 15. 7. kun ĉirkaŭ 150 partoprenintoj el 14 landoj. En la kongresejon, kiu estis la pastra seminario de la teologia fakultato, venis krom aliĝintoj okaze de la inaŭguro la vicurbestro de la urbo, kiu alparolis kongresanojn en senerala Esperanto, kaj rektoro de la seminario. Nature ne mankis gvidaj funkciuloj de IKUE surfrunte kun s-ano D. Magnani, la prezidanto. Inter italaj partoprenintoj estis ankaŭ episkopo el la urbo Vigevano kaj reprezentantoj de Radio Vatikano. Ĉeĥan Esperanto-Asociacion reprezentis prezidanto ing. V. Kočvara. La kongreson salutis reprezentantoj de landaj IKUE-sekcioj, reprezentanto de KELI kaj kelkaj gastoj. En sekvaj tagoj la kongresanoj renkontiĝis ankaŭ kun la ĉeĥa primaso, kardinalo M. Vlk, kiu celebris meson en Esperanto

simile kiel aliaj ekleziaj gravuloj el ĉefepiskopa Olomouc.

Okaze al la kongreso aperis esperantigita biografio de Karolo IV-a, ĉeĥa reĝo kaj imperiestro, kiun li mem skribis en la latina. Kutima kongreslibro estas eksterordinare luksa kaj enhave riĉa aparte por kredantoj, ĉar ĝi enhavas Esperantan tradukon de la Sankta meso inkluzive ĉiujn preĝojn kaj ankaŭ 42 plej ofte kantatajn kantojn (sen notoj). La enhavon kompletigas salutvortoj, kompleta kongresprogramo kaj klarigoj al ekskursoj.

Oni devas gratuli al la ĉeforganizanto, s-ano Miloš Šváček, kiu ofereme kaj pripense kun nemultaj kunlaborantoj ĝustatempe plenumis ĉiujn necesajn preparojn kaj laborojn.

Pri la 48-a IKUE-kongreso informis ankaŭ la ĉeĥa televidprogramo en la 2-a programo jaŭde la 13-an de julio en vespera programo „Report“ kaj raportojn alportis kelkaj nacilingvaj gazetoj.

-Vlko-

## EKS-JUNULARO KUNVENIS

En Ostrava okazis sabate 3. 6. 1995 kunveno de iamaj aktivuloj en junulara movado de la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj. Partoprenis preskaŭ 40 personoj ne nur lokaj, sed el Lešany, Brno, Píerov kaj Opava. Ni ne nur rememoris, sed instigis partoprenantojn, ke ili laŭ siaj eblecoj denove iom aktivigu. Al same domaĝitaj ni rekomendis aliĝi al Asocio de Handikapuloj. Ĉar plejparto dum dekjaroj ne aktivis, ni parolis nur sporade esperante. Sed kiam ni komencis rememori je kantoj, ĉiuj kantis kun ni famajn kantojn „Mariša, kisu min“, „Mi estas profesoro“, „Ranoj“ kaj aliajn.

Niaj klubanoj preparis refreŝigan manĝon

en klubejo, do ni svarmiĝis de la 15-a horo ĝis la 22-a vespere. Ĉar al ĉiuj plaĉis la etoso, ni decidis kunvokadi similan renkontigon ĉiujare. Venis 10 skribajoj, kie senkulpiĝas multaj tiamaj aktivuloj, ke ili ne povis alveturi, sed promesis certe veni venontfoje. Interese parolis ing. Jan Werner el Brno kaj plej malproksima partoprenanto Fr. Struminský el Lešany. Je la fino parolis ing. V. Kočvara, ne nur kiel iama junularaktivulo, sed li informis nin pri novaĵoj kaj situacio de ĈEA. Ni tre bezonas nun, kiam proksimiĝas UEA-kongreso en Prago, montri al la tuta mondo, ke ĉe ni estas bone funkcia movado. Li instigis ĉiujn, ke ili partoprenu tiun plej gravan feston de la tuta esperantistaro kaj helpu al ĝia sukceso. Ni devis atendi de jaro 1921 je tiu ebleco. Estas nia devo vekti ĉiujn, eĉ iamajn esperantistojn kaj aktivigi ilin. Ni 75 jarojn sopiris je tiu momento, kiam Ĉeĥio fariĝos centro de ĉiuj esperantistoj en la mondo.

Nia renkontigo helpis en vekado de forfalintaj esperantistoj. Pripensu, ĉu vi ne povus kunvokis similan aranĝon ĉe vi?

Drahomír Kočvara

## Informoj el la komitato de ĈEA

La junia sesio de la komitato okazis 10. 6. 1995 en Prago. Ĉar kelkaj taskoj el pasintaj kunvenoj ankoraŭ ne plene finiĝis kaj la novaj ne multnombriis, estis la traktado malpli longa ol kutime.

La aktuala stato de la asocia mastrumado montris ioman ekvilibron - do la raporto estis akceptita. Pli da intereso estis dediĉita al nia asocia organo Starto, por ke en kurta tempo estu nuligata ĝis malfruigo. La 4-a numero estos prove eldonota kaj



dissendata en Opava.

El la kongresa temaro mi menciuj, ke al Tampere veturos el Praga 17-kapa karavano. Antaŭ UK en Finnlando okazis la 48-a IKUE-kongreso en Olomouc - informon pri ĝi vi legu aliloke. Pri la 81-a UK en Praha enprogramiĝis nur kelkaj bazaj informoj - aperis jam la aliĝilo, oficiala afiŝo, iom diskutebla. Sed kun-labore agordigo inter LKK kaj Centra Oficejo de UEA iom lamas. Plue estis traktita aŭtuna konferenco de ĈEA, kiu okazos en Brno 20. - 22. 10. 1995 sam-tempe kun la festivalo „Filmo kaj video en Esperanto”, kiun organizas privata firmao KAVA-PECH. Diskuto solvadis progra-mon de la konferenco. Pri ĝi respondecas komitatano V. Podhradská, al kiu oni direktu eventualajn demandojn. La komi-tato decidis ekde la venonta jaro nuligi membromarkojn, ĉar ilia funkcio montri-ĝas superflua. Tio ŝparas elspezojn de la asocio, ĉar prizorgi ilin kaj manipuli kun ili ĉerpis el niaj financoj. La membrecon al la membroj konfirmas regula ricevado de Starto kaj en la kazo de bezono kontroli la memrecon oni povas facile rigardi en la centran membrokartotekon sur diske-toj, kiu estos baldaŭ preta. El „diversaĵoj” elstaras la tute nova eldonaĵo - Esperanto-klubo en Třebíč nove eldonis la libron „La Blanka mal-sano” de Karel Čapek en la traduko de Theodor Kilian. La eldonaĵo estas sam-simila kiel la unua el la antaŭmilito. Inter-suloj pri ĝi turnu sin al la eldoninto aŭ al la asocia libroservo - s-ano inĝ. Zdeněk Pluhař.

Vlastimil Kočvara



81-a UNIVERSALA  
KONGRESO  
DE ESPERANTO  
26-27 julio 1996  
Prago, Ĉeĥa Respubliko

## Lingva angulo

Esperanto ne havas silaboforman konsonanton (l, r)

La plejparto de E-aj vortoj estas latin-devenaj, tial ni devas konsideri Esperanton fonetika lingvo latinida kaj kongrui ĝian fonetikon al aliaj vivantaj latinidaj lingvoj, precipe al la itala, plej proksima ido de la latina. (Spite al la fakto, ke kompare al la itala E-o havas pliajn konsonantojn, kiujn la itala fonetiko malhavas. - Ĉar la latinidaj lingvoj ne konas la silaboformajn r kaj l, kiun havas nur kelkaj slavaj lingvoj (almenaŭ en Eŭropo), do nur concernaj slavoj kapablas ĝin prononci dusilabe en la nomoj Brno, Plzeň, ĉiuj aliaj kun ĝeno unusilabe. - Tial indas uzi esperantigitan Pilseno kaj Brunno (laŭ la latina formo) kun duobla n - por diferencigi la historian *Brunna* disde la *bruna* samkiel oni diferencigas *finno* kaj *fino*. Cetere la moravia metropolo jam longe meritas havi sian Esperantan nomon.

M. Smyčka

## Ĉu vi estis en Olomouc?

„Mi legis pri la kongreso en gazeto, ĉu vi partoprenis ankaŭ?” Tiel kaj simile demandis min miaj amikoj kaj konatoj, kiuj scias, ke mia vivo estas kunligita jam longjare kun la verda steleto.

„Memkomprene! Ĉu mi povus preterlasi la raran okazon, nome kongreson de IKUE, kiu okazis lastfoje en nia lando en la jaro 1936 en Brno? - Jes, mi ĉeestis kaj mi transdonos al vi miajn spertojn, laŭ via deziro.”

Pli ol 160 partoprenintoj el 14 landoj kunvenis dum sabato la 8-an de julio 1995 en

Olomouc, loko de la 48-a IKUE-kongreso, kies devizo estis: *La eklezio, popolo de Dio, renkonten al la tria jarmilo.*

Ni salutis nin reciproke en la akceptejo kun multaj konatuloj, sed ankaŭ ĝis nun nekonataj ĉeestantoj. Nur mallonge ili ŝajnis al ni nekonataj. Baldaŭ ni formis kvaŭzaŭ unu familion kaj ni eĉ ne rimarkis, ke ili alveturis el Pollando, Hungario, Italio, Ukrainio, Germanio, Francio, Aŭstrio, Slovakio, Nederlando, Rumanio, Litovio, Ruslando, Vatikano.

El la kongresa libro ni eksciis precizan programon por ĉiu tago kaj krom tio ĝi enhavas multajn aliajn gravajn informojn kaj tekstojn de la kantoj kaj preĝoj. Ĉi tiuj tekstoj nepre ne restis sen utilo kaj pri tio zorgis senlace Patro Zielonka, kies forta bela voĉo estis ĉie aŭdebla kaj kiu insiste kantigis nin kun plena sukceso.

Kiel ĉe ĉiu simila okazo, la kongreso estis malfermita per solena inaŭguro sabate vespere dum ĉeesto de oficialaj gastoj enlandaj iaj alilandaj. Ni nomu almenaŭ reprezentanton de la urbo Olomouc, kiu tra legis saluton en Esperanto, la episkopon el Italio monsinjoron Locatelli, kies itala parolo estis tradukata, prezidanton de ĈEA Ing. V. Kočvara, reprezentanton de la seminario, sub kies tegmento ni nun vivis, parolanta ĉefe kun traduko, prezidanton de IKUE Duilio Magnani, parolanton de la vatikana radio Carlo Sarandrea kaj ceteraj. Poste estis prezentitaj ankaŭ salutleteroj. Mia imago, ke ĉi tiu solena ceremonio estos pure serioza afero, montriĝis tute erara. Ĉiuj partoprenantoj unuiĝis en la opinio, ke ĝi estis tre ĉarma kaj ĝojiga afero, kie ne mankis eĉ rido. Al ĉi tiu stato kontribuis precipe litovo Vladislavas Viršila, kiu dum sia parolado disdonadis trafikajn donacojn kaj kelkajn altrangulojn dekoraciis per skarpo.

Komenco bela, do espereble ankaŭ la tuta semajno, estanta antaŭ ni, estos simila. Kaj mi revenante hejmen, devas konstati, ke ĉi tiu mia espero efektiviĝis.

La loko, kie ni travivis la plej grandan tempon de nia restado, estis ĉefepiskopa seminario, kie ni loĝis, manĝis kaj kie ankaŭ okazadis kunvenoj, prelegoj, programoj. Loĝado kaj same manĝaĵo estis plene kontentigaj. Mi kun mia kunulino loĝis en la plej supra etaĝo - tio signifis kelkfoje dum la tago venki preskaŭ 70 ŝtupojn supren kaj malsupren - sed ĉi tiu nia gimnastika ekzerco estis rekompencita per bela rigardo al la urbo de supre, precipe vespere kaj nokte, kiam estis bele iluminitaj gravaj konstruaĵoj kaj ni povis el nia fenestro vidi eĉ klare prilumitan Svatý Kopeček (*Sankta Monteto*).

En kadro de la solena inaŭguro efektiviĝis bela koncerto de la operkantisto M. Smyčka dimanĉe en la preĝejo de Sankta Miĥaelo. Multaj konataj komponaĵoj eksonis en Esperanto, ekz. Bibliaj kantoj de A. Dvořák, Ave Maria de Schubert, Largo el la opero Kserkseso de G. F. Händel k. a. Sanktaj mesoj estis celebrataj ĉiutage en alia preĝejo de Olomouc - Sankta Miĥaelo, Sankta V. Maria la Neĝa, Sankta Maŭricio kaj katedralo de Sankta Venceslao - kaj kompreneble en Esperanto, ĉar ĝi estis oficiale agnoskita kiel liturgia lingvo same kiel naciaj lingvoj. Ankaŭ la ĉefaj celebrantoj ŝanĝiĝis ĉiam kun asistado de 12 ĉeestantaj diversnaciaj pastroj. Ŝanĝo de la preĝejoj utilis al ni por ekkoni ilin, sed ankaŭ - kiel ni povis persone konvinkiĝi - la loĝantaro de la urbo havis pli da okazo renkontiĝi kun Esperanto. Kaj pluraj el ili uzis nian proponon de la esperanta teksto de la kantoj kaj kantis kun ni kun evidenta plaĉo.

Lundo estis tago, kiun ni atendis kun

speciala ĝojo. Al la kongreso alveturis kardinalo Miloslav Vlk. Post sankta meso kun alparolo en perfekta Esperanto ĉe V. Maria la Neĝa, li venis inter nin al seminario, kie estis diverstema debato kun kongresanoj. Sed ankaŭ diversspecaj demandoj estis celitaj al li, kiujn li afable respondadis kun saĝeco de animpaŝtisto, sed ankaŭ kun senco por humuro. Restis tie ĝoja atmosfero, kaj la kardinalo akiris per sia neformala konduto ĉies simpatian. Nur nevolonte ni adiaŭis lin, kiam - post vespermanĝo en nia rondo - li denove forveturis.

Nia unua ekskurso dum la kongreso efektiviĝis lunde posttagmeze, kiam ni per aŭtobusoj veturis al proksima Sankta Monteto. Belega baroka preĝejo sonis per esperantaj preĝoj kaj kantoj.

Kiam mi jam menciis ekskurson, mi nepre ne povas ellasi informon pri nia ĉefa jaŭda tuttaga ekskurso. Nia unua celo estis Sankta Hostýn - el foraj lokoj videbla bela Maria-pilgrimloko, situanta en la alto de 736 metroj. Ĉi tie ni preĝis sanktan rozaŝon, kiun tie gvidis partoprenantino el la pola radio kaj nederlandano. La dua tiutaga celo estis Velehrad, en kies majestaj spacoj eksonis ankaŭ Esperanto. Kaj la tria loko vizitita estis Dub nad Moravou, meze de la fekunda regiono Haná.

Multaj interesaj renkontiĝoj kaj interparoloj efektiviĝis dum la kongreso. Mi povis ĉi tie post pli ol 20 jaroj denove paroli kun geedzoj Thuinder el Nederlando, kiuj multajn jarojn laboras por blinduloj, precipe en la tria mondo. Nun celas ilia tiuspeca laboro al Albanio. El babilado kun iu blinda samideano el Italio mi eksciis, ke li estas enamiginta al la Najado de Antonín Dvořák kaj ege sopiras ekhavi la tekston de ĉi tiu opero en Esperanto. Fino de la semajno, fino de la kongreso.

Vendrede estis solena sankta meso en la katedralo celebrata de la ĉefepiskopo monsinjoro Jan Graubner kun helpepiskopo Josef Hrdlička. Kvankam neesperantisto, monsinjoro Graubner ne nur celebris en Esperanto, sed lia alparolo ankaŭ estis en ĉi tiu lingvo. Post ĉi tiu diservo prezentis al ni kvar gefratoj Ĉerní (12 - 18jaraĵ) sceneton pri s-ta Zdislava. Esperantan tekston ili scipovis parkere ellemi dum ne multaj tagoj.

Kaj vespere okazis jam adiaŭa kunveno. Infanoj el Česká Třebová prezentis al ni programon, kiun ili preparis por sia ekskurso al Francio. Poemojn alternis kantoj, en kiuj superis italoj, kiuj kantis italajn kantojn kun tiel forta elano, ke ili infektis ankaŭ ceterajn ĉeestantojn.

Ĉio havas sian finon, do ankaŭ nia restado en Olomouc. Dankon por ĉio - ni travivis vere belajn tagojn. Ĉiu kongresano havis en siaj kongresaj materialoj ĝuste por tiu okazo eldonitan libron „Karolo la IV-a, la propra biografio“, en la traduko de Josef Vondroušek.

Marta Lorková

## La 8-a Internacia kultura festivalo en Ústí nad Labem

29. 9. - 1. 10. 1995

jam tradicie omaĝe al  
Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr

Vendrede Interkona Vespero en la manĝejo de Distrikta Ofico ústí nad Labem, Mírové náměstí 36, ekde la 19-a horo, sabate prelega matineo, posttagmeza ekskurso, muzika vespero, dimanĉe bus-ekskurso al la monaĥejo Osek.

Informoj: Ing. J. Kříž, Družstevní 411/7  
400 07 Ústí nad Labem, Ĉeĥa Respubliko

## PLUA STRATO NOMITA LAŬ ESPERANTISTO

Sabadell estas kataluna urbo 20 km norde de Barcelono kun proksimume 200 mil loĝantoj, kiuj vivtenas sin precipe per lan-kaj silk-industrio. La Magistratejo de la urbo decidis, ke Sabadell horonos unu el siaj filoj, kaj ekde la 26-a de aprilo 1995 estas al la centra urba pasejo oficiale atribuita la nomo de la konata hispana esperantisto Luiso Mimó Espinalt. Tiu lianoma strateto situas apud la fama firmao „El Corte Inglés“, ĉe la grava loka arterio „Francesc Macià“, frontanta la belan „Parkon Katalunujo“, proksime de kiu troviĝas la „Bulvardo Zamenhof“ kun Monumento al la Majstro.

Luiso Mimó Espinalt, kiu naskiĝis kaj mortis en Sabadell (1913-1986), ellemis Esperanton kiel 18-jara junulo, ravita de ĝia reguleco kaj logikeco. Studinte profunde la lingvon kaj ĝian gramatikon, li analizis la lingvaĵon de plej elstaraj esperantistoj kaj kritikis iliajn esprimojn bazitajn sur tradicio. Kontraŭ la „Plena Gramatiko“ de Kalocsay kaj Waringhien li starigis siajn „Perfektecio de la Esperantaj verboj“ (1963) kaj „Lemolibron de Regula Esperanto“ (1973). Li fondis la „Analizan Skolon“, kiu klopodas science analizi la esprimadon en Esperanto el vidpunkto de la logiko kaj reguleco, kvankam ĝi plurfoje devias eĉ de la Zamenhofa Fundamento (ĝiaj plej famaj reprezentantoj nun estas Richard Schulz, Herman Bormann kaj Wilhelm Luttermann el la Esperanto-Centro Padernborn). Li postlasis ankaŭ plurajn tradukojn: Tamen civilizitaj kaj Neĝobulo (komedioj de Carles Soldevila), Don Juan Tenorio (José Zorrilla), Kataluna Don Quljote (Santiago Rusiñol), Sinjorino Perfektino (Pérez Galdós). Li

kunlaboris ankaŭ pri la internacia komerca-ekonomia vortaro en naŭ lingvoj (1975) kaj en manuskripto restis lia Kastilialingva-Esperanta Vortaro. (laŭ KAE-informilo 11/1995)

## LIBRARO DE STS-ĈEA

La biblioteko de la scienca-teĥnika sekcio de ĈEA nun troviĝas je la adreso Ing. Jan Pospíšil, Petrohradská 3112, 272 04 Kladno.

La librolisto estas aranĝita laŭ aparte signitaj fondusoj:

V - vortaroj, terminaroj

F - faka literaturo konsistanta ne nur el libroj kaj broŝuroj, sed ankaŭ el prelegtekstoj, gazetartikoloj k.s.

P - prospektoj pri varoj, establoj k.s.

G - gazetoj kaj aliaj periodaĵoj.

Interne de la fondusoj V, F kaj P estas la titoloj aranĝitaj laŭteme surbaze de la UDK-sistemo. Interne de la fonduso G estas la titoloj aranĝitaj alfabeto.

En la librolisto estas uzitaj la mallongigoj:

p. - paĝo, paĝoj

SAEST - Seminario Apliko de Esperanto en la Scienco kaj Tekniko

SR - Scienca Revuo, eldonaĵo de ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista)

STS - scienca-teĥnika sekcio (de Ĉeĥa Esperanto-Asocio)

SUK - Somera Universitata Kurso (en Liège, Belgio)

UDK - Universala Decimala Klasifiko; supervidon de la sistemo vidu en ĈSN 01 0180.

La lingvoj estas menciitaj per mallongigoj laŭ ISO Recommendation R 639 (ISO -

International Organization for Standardization):

Ar - araba	Nl - nederlanda
Bg - bulgara	Pl - pola
Cs - ĉeĥa	Pt - portugala
D - germana	R - rusa
E - angla	Ru - rumana
Eo - esperanto	S - hispana
F - franca	Sh - serbokroata
G - greka	Sk - slovaka
Hu - hungara	Sv - sveda
I - itala	Tr - turka
J - japana	

La libroj estas pruntataj laŭ regularo aprobata de la sekcio (STS-ĈEA) 1981-11-11. En la petskribo pri libro(j) ktp. estas menciendaj: Nomo de aŭtoro, titolo kaj signo de koncerna libro. Signo estas la substrekita liter-cifera grupo fine de ĉiu libroindiko en la sekvanta listo.

**Rimarkigo:** Se vi posedas fakan libron, broŝuron, gazeton en Eo, kiu mankas en la listo kaj kiun vi ne bezonas, ofertu ĝin por la biblioteko. La sekcio kaj ĝia membraro estos al vi dankemaj.

## A. VORTAROJ, TERMINAROJ (Signo V)

- V 001: Boirac, E.: Plena vortaro A-K. 1909, 204 p., Eo, F  
 V 002: Réau, L.: Polyglotte des termes d'art et d'archéologie. 1928, 188 p., F, L, I, S, Pt, E, D, Nl, Da, Sv, Cs, Pl, R  
 V 003: Bildordboken (Bildvortaro). 1949, 504 p., Sv, E, F, D  
 V 004: Technical dictionary of road terms in 6 languages. 1951, 320 p., Da, D, E, S, F, I  
 V 010: Venture, A.: Radio-terminaro. 1960, 36 p., Eo  
 V 011: Verda, M. kaj V.: Kudra kaj trika terminaro. 1960, 24 p., Eo

- V 012: Haferkorn, R.: Technische Wörterbuch... (Teĥnika vortaro germana - esperanta). 1967, 84 p.  
 V 020: Broise, A.: Leksikono pri vojo. 1957, 98 p., Eo  
 V 021: Broise, A.: Inĝeniera terminaro pri Ŝosekonstruo. (Lumkopijaĵo), 41 p., Eo, E, F  
 V 025: Wüster, E.: Maŝinfaka Eovortaro pielementa. 1923, 112 p., Eo, D  
 V 029: Epton, H.A.: The international Radio Manual. 1925, 80 p., E, Eo  
 V 030: Ginz, O.: Radioamatérský slovník pětijazyčný. 1927, 228 p., Cs, Eo, D, F, E  
 V 044: Malgranda vortaro aŭto-turisma. Eld. FIAT, 32p., I, Eo, F, E, D, S  
 V 048: Eyama-Tokiziroo: Aŭta terminaro Ea-japana-angla. 1969, 142p.  
 V 053: Csatkai, D.: Hatnyelvu geodéziai szalszótár (Geodezia fakvortaro). 1-a vol., 1976, E, Eo, F, Hu, D, R  
 V 067: Siwicki, K.: Internacia elektroteknika vortaro. Grupo 05 - Fundamenta terminaro. 1963, 56 p., Eo, Pl  
 V 068: Internacia elektroteknika vortaro. Grupo 07 Elektroniko, 08 Elektroakustiko. Varsovio 1965, 174 p., Eo, Pl, E, F, D, I, Sv  
 V 069: Siwicki, K.: Internacia elektroteknika vortaro. Grupo 10 Maŝinoj kaj transformiloj. 1963, 42 p., Eo, Pl  
 I-V 092: Hradil, J.: Ea medicina terminaro. 1979, 29 p., Eo  
 V 095: Fiatal, D. k kol.: Aŭtoturisma vortareto. 1977, 45 p., Eo, Hu, Cs, Sk, D, Pl  
 V 097: Több nyelvű... (Plurlingva sanitara ekonomia vortaro). 1974, 96 p., Hu, Sh, S, Eo  
 V 098: Demografia vortaro. 1974, 92 p., Eo, Cs, E, F, S, R  
 V 106: Waringhien, G.: Plena Ilustrita Vortaro de Eo. 1970, 1342 p.  
 V 135: Telekomunika vortaro deklingva kun aldonitaj Eaj tradukoj. TC-ISAE, 1979, 98 p., E, F, D, S, I, NI, Pl, Pt, R, Sv, Eo

1979, 98 p., E,F,D,S,I,NI,PI,Pt,R,Sv,Eo  
**V 141:** ON 79 8001 Názvosloví kožeš-  
 nických strojů, zařízení a náradí. 1980, 52  
 p., Cs, Sk, R, E, D, F, S, Eo  
**V 143:** Internacia elektroteknika vortaro.  
 Grupo 07 Elektroniko. Publ. TC-ISAIE  
 77/1, 104 p., F,E,D,S,I,NI,PI, ald.Eo  
**V 154:** Noyer, G. kaj V.: Ärztlicher Dol-  
 metscher (Kuracista interpretisto), 1980,  
 316 p., D,R,E,F,Bg,PI,Ru,Cs,Hu,  
 Ar,Eo,I,Sv,S,Tr,G,Sh  
**I-V 155:** Werner, J.: Esperanta terminaro  
 de terminologia fako, 1982, 14 p., Eo,E,Cs  
**V 165:** A váallatírányítási... (Kvinlingva  
 komputika vortaro). 1972, 464 p., Hu,D,  
 E,R,Eo  
**V 171:** Rybář, J.: Terminaro de hidraŭlaj  
 meĥanismoj. 1982, 52 p., Eo,E,Cs,F, D,R

## **B. FAKA LITERATURO (Signo F)**

### **Ĝeneralaj aferoj. UDK 0**

**I-F 096:** SAEST 1978. Kolekto de  
 seminarioj referaĵoj. Žilina, 81 p., Eo  
**I-F 153:** SAEST 1980. Kolekto ... Ústí  
 n.L., 104 p., Eo  
**I-F 162:** SAEST 1982. Kolekto ... České  
 Budějovice, 93 p., Eo  
**I-F 134:** Konsilaro por la farado de la  
 sciencaj kaj tehnikaj vortoj. ISAE, 1911,  
 80 p., Eo  
**F 101:** Eichholz, R.: Ĉu komputero,  
 komputilo, komputoro, komputro aŭ kiu?  
 Cirkulero TC 76/1. 1976, 16 p., Eo  
**I-F 144:** Recommendation ISO R 919.  
 Guide pour l'élaboration des vocabulaires  
 systématiques (Gvidilo por ellaborado de  
 sistemaj vortaroj). 1969, 16 p., F  
**I-F 145:** Recommendation ISO R 1149.  
 Présentation des vocabulaires systémati-  
 ques multilingues (Arango de plurlingvaj  
 sistemaj vortaroj). 1969, 24 p., F  
**I-F 146:** DIN 2333. Fachwörterbücher.  
 Stufen der Ausarbeitung (Fakaj vortaroj.

Etapoj de prilaboro). 1974, 10 p., D  
**F 136:** ČSN 01 0181. Abecední řazení.  
 1978, 32 p., Cs  
**F 137:** ČSN 01 0192. Rejstriky publikací.  
 1978, 12 p. Cs  
**F 161:** Möller, O. - Krausse, F.:  
 Systemübersicht der Anpassung der Deu-  
 tschen Stenografie an die internationale  
 Sprache Esperanto. 1979, 12 p., D  
**F 156:** Hršel, Z. - Kyjovská, B.: Eo.  
 Soupis literatury z fondů Státní vědecké  
 knihovny v Brně. 1981, 40 p., Cs  
**I-F 107:** Karásková, R.: Esperantská  
 literatura 1900-38 (soupis R 799) a  
 1946-79 (soupis R 800) ve fondech SVK  
 v Olomouci. 1979, 7+4p., Cs  
**F 064:** Bibliografio de matematikaj kaj  
 natursciencaj terminaroj en Eo. Dokumento  
 E/V/4 de CED. 1972, 4 p., Eo,E  
**I-F 085:** Holmstrom, J.E.: Interlingual  
 Scientific and Technical Dictionaries.  
 1949, 68 p., E

### **Soci-sciencaj verkoj. UDK 3**

**F 032:** Universala deklario de homaj  
 rajtoj. 1968, 12 p., Eo  
**F 094:** Direktivoj de la XXIV-a kongeso  
 de KPSU. 1971, 60 p., Eo  
**F 026:** Tonkin, H.: Financa evoluigo.  
 Manlibro pri la financa programo de la  
 Eo-movado. 1976, 64 p., Eo  
**F 160:** Pál, J. - Juhász, J.: La hungara  
 kooperativa movado. Historia trarigardo,  
 faktoj pri la agado. 1982, 14 p., Eo

(daŭrigota)

### **Korespondi deziras:**

Fraŭlo el Berlino deziras kontakti ĉeĥajn  
 samideanojn kaj korespondi pri diversaj  
 temoj (historio, kulturo, lingvo, politiko  
 ktp.): **Andreas Joachim Penk, Zingster  
 Strasse 43, DE-13051 Berlin (Malchow)**


## KONTRAŬRASISMA SEMINARIO BERLINO 27/29-10-1995

**Rasismaj eldiroj kaj frazoj ekzistas en multaj landoj,  
ofte kaŝitaj kaj ne rimarkataj de la aŭtoroj mem!**

La seminario, organizata de gejunuloj (Esperanto-Junularo Brandenburg/Berlin, Berliner Str. 49, 14467 Postdam) celas sentigi la rasismojn kaj pensigi pri kontraŭagoj. Gvidos profesiaj kontraŭrasismaj klerigantoj. Loko: Internacia Renkontiĝejo Ĉaskastelo Glienicke, Berlin. La partoprenkotizojn por ĉeĥoj bvl. pritrakti kun la organizantoj:

☒ / fakso 0331/294003 aŭ 030/1834320

### La rakonto pri la nigraj buboj



**Český esperantský svaz**

**ESPERANTO, p. s. 1069**

**111 21 Praha 1**

**☆ STARTO ☆**

**Periodikum Českého esperantského svazu**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno**

**Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha**

---

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 15 gld**

**Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno**

**Ĉeĥa Respubliko**

---

**Podávání novinových zásilek povoleno**

**Českou poštou, s. p., Odštěpným závodem Severní Morava,**

**č. j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995**



# **NOVINOVÁ ZÁSILKA**

**Poštovné hrazeno v hotovosti  
u pošty 746 01 Opava 1**